

REVUO

Monata Aldono al „Esperanto Triumfonta“

NUMERO 10

1923

SEPTEMBRO

Romaj Impresoj.



Trinità dei Monti.

Trinità dei Monti.

En la vualon de la sunsubiro la Tago kliniĝas.

Nun devas mi disiĝi de tiu belaĵo el glacia kaj viva marmoro, glacia kaj viva kiel mumia vizaĝo, devas mi malsupreniri tiujn ŝtuparojn milfoje paŝatajn kun animo vaganta en ĉielo de senfina beleco.

Ĉar estas la momento, dum kiu io mortas kaj fekundas alion per sia morto. Estas tiu nura momento. Kaj jam la timo de la vivo plenigas mian koron je la ombroj de la sonĝo. Romo ekfajriĝas kaj min alvokas.

Trinità dei Monti, senmova beleco, mi lasas al vi mian sonĝon kiel nevideblan garantiaĵon: kiom da fojoj mi vin admiris el via pensiga sanktejo, pilgrimiranto ĉiutage pli malfeliĉa!

Ĉu estas hodiaŭ minuto aŭ jarcento, de kiam mi vin observadas, kaj doloras min ne havi pli larĝajn okulojn por pli bone ankoraŭ vidi vin? Mi ne scias. Via beleco brilas kiel realaĵo nemalhelpata, nek per spacomanko, nek per templimigo. Via beleco kuŝas kiel granda miljara arko en la senfina kriptoj de l'ĉielo. La lumoj anĝelaj, kiuj vestigas vian silenton, malrapide iĝas vesperaj plorvestitoj. Ekstazo kantas en la ekbrulanta aero. Kaj la tempero estas sama al la ĉiamo.

Ho, alta en la plej latina bluo, Trinità dei Monti, kiu kiel mistika diademo sur la frunto de Romo ĉiame havas kiel juvelojn tutan floran kronon — dum la Dia preĝejo superas kaj kronas vin en gloro vespera, kiu per sia lasta sango promesas ĉiuvespere por morgaŭa tago plej belan sunleviĝon, Trinità dei Monti, viaj ŝtuparoj kun la oferdone de la rozoj, tranĉitaj al viaj piedoj, kun la melodij blinduloj je via dua ebenaĵo, kun la domo de Andrea Sperelli, staranta al via flanko kiel idolana sklavo, kun la bronza kruĉo, kiu ankoraŭ rakontas la dolĉecon de la Dia premo sur via frunto fajra kaj ĉiama — Trinità dei Monti, vi estas la trankvileco de Kristo sur gracia trono reganta. Kaj senvorte kantadas pri vi la animo mia.

Sed la aro de la vesperaj anĝeloj kovras la Ĉiaman Urbon. Kaj nur momenteton ankoraŭ mi povas rigardi de el vi la placon kaj la stratojn, sur kiuj moviĝas la homaj insektoj.

Kaj kiel anima respiro, ne kiel vera sono, alvenas ankoraŭ al mi, iam kaj tiam, superigata de l'homa bruo, la voĉo malgaja de la kvar muzikistoj de l'mizero, kiuj antaŭ la marmora murego kriigas sian noktan animon per la violonaj kordoj.

Mi malsupreniras la ŝtuparon por alproksimiĝi al tiu kriado malgaja kaj aŭdadas . . . la melodiojn de la blinduloj, apogataj al la ŝtono, senmovaj kaj palaj kiel la aĵoj ŝajne konsciaj de tia fatala kuniĝo . . .

Trinità dei Monti, Roma juvelo, mi adiaŭas vin . . .

Originale

Ernest Hediger, Roma (Italujo).

La lama belulo.

De Charles Foley.

Fraŭlino Olimpa estas librovendistino en la strato Ballu, 45-jara, malgracia, maldika, nefidema kaj malgaja persono.

De dek jaroj, mi provizas min en ŝia librejo, nur tial, ĉar la butikoj estas tute proksima de mia loĝejo. De tempo al tempo, kiam mi estas en petolema humoro, mi petas la malagrablan Olimpa'n vendi al mi priamromanon „la plej maldecetan“! Tuj la serena vizaĝo de la malridema vendistino esprimas abomenan senton, kaj ŝi akcentas sian respondon per grimaco: „Jen la fako de maldecaj verkistoj. Vi povas fari vian elekton!“

Iutage, mi troviĝis tute sola en la butikoj kun fraŭlino Olimpa. Mi vigligis mian ŝercadon. Mi parolis al ŝi, pri ŝiaj juneco, agrableco, pri la amsentoj, kiujn ŝi estigis en virkoroj.

„Ne moku!“ interrompis la malĉarma virino. „Se vi estus rigardinta min pli bone, vi estus konkludinta, ke neniam mi estis bela . . . kaj amata!“

„Je tio mi ne povas kredi, fraŭlino! Vi estas tro modesta! Cetere, kiu virino de 16 ĝis 40 jaroj, bela aŭ nebela, ne travivis etan amromanon?“

Mia insisto, anstataŭ eksciti ŝian koleron, ŝajnis revivigi en ŝia animo malserenigan rememoron. Ĉu mi divenis la veron? Ŝia nehela rigardo lumiĝis, konfesintenco tremetigis ŝiajn lipojn, ŝi ŝanceliĝis. Poste, tuj haltigante la konfidenciojn elirontajn el ŝia buŝo, ŝi silentis. Eble neniam ŝi estus eldirinta sian internan sekreton, se en la sama momento pordo en la kontraŭa flanko de la strato ne estus malfermiĝinta. El la Vaudemont'a luksa domo eliris tiu, kiun oni nomis „lama belulo“, t. e. s-o Grafo Henriko de Vaudemont. Li paŝis sur la trotuaro, sin apogante sur bastonon, kaj malaperis per malgracia lamirado.

„Jen mia amromano!“ ekkris fraŭlino Olimpa, montrante la lamulon.

Sub la influo de la emocio kaŭzita de mia maldiskreteco, per la fluo de rememoraĵoj kaj vido subita de tiu kvardekjarulo ankoraŭ tiel loga, malgraŭ lia kriplaĵo, la maljuna fraŭlino tuj malkaŝis sian sekreton. Emocitremante, en la komenco ruĝiĝante, poste paliĝante ŝi estus fordoninta ĉion, por repreni siajn vortojn. Tro malfrue! Mi volis sciiĝi pri la tuta afero. Ne permesante al ŝi rekonsciiĝi, mi ŝin demandis tiel insiste, ke ŝi estis konfuzita, venkita, kaj fine ŝi cedis je la deziro, kiu instigas la amintinojn, eĉ la plej kaŝemajn, rakonti pri siaj amaventuroj.

„Ĉar estas necese ĉion al vi diri,“ ŝi flustris, vibrante pro venĝemo, „sciiĝu, ke s-o de Vaudemont lamas, ĉar li volonte tion volis!“

„Mi luis ĉi tiun butikon, intencante min feliĉigi per lia puno, por esti rememorigata senĉese pri tio, por konservi min en malŝato pri la viroj kaj iliaj pasioj.“

Poste, pli mallaŭte, ŝi klarigis al mi :

„Antaŭ dudek jaroj, mi estis guvernistino en la familio de la maljuna barono de Méricourt. Dum tiu somero, ni loĝis en granda lignodomo, kiu altiĝis sur la sabla marbordo.“

„Loĝante aparte, sur la dua etaĝo, en tureto, de kiu oni vidas la maron, mi tamen streĉis mian atenton pri ĉio, kio okazis en la domo. La maljuna barono havis apartan dormoĉambron, kaj baldaŭ mi ekrimarkis, ke la baronino multe pli juna ol ŝia edzo amis pasie sian kuzon Henriko de Vaudemont, nian gaston. Ŝi lin akceptis ĉiuvespere en sia ĉambro. Mia konscienco kompreneble devigis min atentigi pri tio la baronon. Sed tamen mi ne faris tion, ĉar mi jam spertis la ĵaluzeman, senbridan, maldelikatan karakteron de la maljuna edzo kaj ankaŭ, ĉar sekrete en profundo de mia koro mi amis tiun belan Henrikon, tiel elegantan, tiel afablan.“

„La malfeliĉo ekkokazis sen mia partopreno. Lunokte, dum kiu mi ne povis ekdormi, mi aŭdis frustratajn vortojn kaj ŝtelrapidajn paŝojn sur la unua etaĝo. La barono, sendube avertite, ŝlosis la pordojn de la subaj etaĝoj kaj subite, neatendite eniris la ĉambron de sia edzino. S-o de Vaudemont povis ĵus eliri el la ĉambro, supreniri sur la ŝtuparo ĝis la dua etaĝo en la tureton kaj eniĝi la koridoron. Tuj instinkte mi malfermis la pordon de mia dormejo kaj poste ĝin fermis senbrue. Li estis palega, tamen li gardis sian kuraĝon. Mia maltrankvileco pruvis al li, ke ĉion mi scias, kaj li ne provis uzi hipokritaĵon.“

„Dankon, fraŭlino! Sed via noblanimeco donos al mi nur malgrandan prokraston, li diris kun tiuj rigardo kaj rideto, kiuj estis liaj ĉefaj ĉarmaĵoj, ĉar s-o de Méricourt kun siaj servistoj tute armitaj tuj esploros la tutan domon. Ili certe frapos al via pordo, kaj malgraŭ via neesperita helpo mi estos pereigata.“

„Ne, vi estas savita, mi flustris nevole, instigite per senpripenso kaj antaŭsentante proksiman morto-danĝeron.“

„Mi diros, ke mi vin amas, kaj ke vi estas mia amanto. Tiu mensogo certe senhonorigos min, sed kompanse vi redonos al mi la honoron, edziĝonte kun mi!“

„De Vaudemont min rigardis. Mi estas certa, ke la amsento, anstataŭ plibeligi mian vizaĝon, igis min pli malbela, ĉar liaj trajtoj, ĝis nun kvietaj, esprimis nepriskribeblan subitan timegon. En la sama momento oni aŭdis frapegojn en la koridoro, kaj la bela kuzo rapidis al la fenestro kaj perforte malfermis ĝin. Antaŭ ol mi povis lin haltigi, la grafo transsaltis la apogilon kaj de la alta tureto senhezite sin ĵetis teren . . .“

Trankviliĝante iom post iom, f-ino Olimpa daŭrigis per maldolĉa voĉo:

„La bela kuzo frakasis siajn krurojn sur la ŝtonegoj de la marbordo. Stertorante li sin trenis ĝis la proksimaj dometoj, por ne kompromiti la baroninon. Ĉe tagiĝo oni lin trovis sveninta. Lia resaniĝo estis malrapidega, kaj li restos kriplulo ĝis sia mortotago!“

Kaj la maljuna fraŭlino finis sian rakonton, dirante kun maldolĉa ĝemeto:

„Nekompreneble, li pliŝatis tiun malfeliĉon ol edziĝi kun mi . . .!“

El la franca lingvo tradukis
H. Guibal, Cette.

Somera mateno.

Serena antaŭmateno. La astroj paliĝas kaj malaperas ien. Jen ankaŭ la matenastro, la ĉarma Venero, la diino de l' beleco kaj de l' amo, — la antaŭsigno de l' tagiĝo sin kaŝas pro la naskiĝanta lumo de l' nova tago!

Matenkrepuskas. La oriento lumas. La maro songas sian lastan revon. Etaj ondoj songe murmuras ĉe la sabla bordo. Silento kaj trankvilo regas ĉie! La naturo ankoraŭ dormas — nenia bruoj, nenia sono. —

Belaspekta pramo glitas sur la blua vastaĵo de l' maro. Ĝia velaro rebrilas ruĝkoloro. Paradante ĝi moviĝas, disfendante la bluan marondaron.

Nigraj ombroj amasiĝas en la ĉielo kaj ree malaperas en la malproksimo. Kvazaŭ ili estas la ĉagrenoj kaj la zorgoj homaj, preter- kaj forpasantaj laŭ sia eterna vojo . . . La nuboj malaperas kaj purigas la bluan ĉielon. La oriento ruĝiĝas kaj purpure kolorigas la plumformajn nubetojn. Sed ili ankaŭ foriĝas ĉe l' apero de l' taga astro. La nigraj nuboj malaperas forpelitaj de l' brilo de la suno. Sammaniere forflugas la zorgoj kaj la ĉagrenoj de l' homo ĉe la lumo de l' nova tago . . . La purpuro kreskas. Parto de l' fajra disko aperas, kaj la suno — la bonfaranto de l' naturo — eliras el la internaĵoj de l' silenta akva elemento kaj surverŝas ĉion per sia radiaro.

La naturo vekiga. La maro ekmoviĝas, ekbruas kaj komencas sian eternan kantadon. Birdoj traflugas, la fiŝuloj serĉas kaptajon, kaj la mevoj plendkrias sur la nudaj rifoĵoj . . . La dombestoj — ankaŭ ili vekiga. Fruvekiĝintaj vilaĝanoj iras al vinberrikoltado. La marbordo ekbruas, la naturo vekiga, kaj ĉi ĉio komprenigas, ke la tago venis.

Originale *Geo Ĥarŝev*, Sofia (Bulgarujo).

Vespere . . .

I.

Subite mallumo ekregas en mia ĉambro, — verŝajne iu elektrofadena difekto okazis. Sed jen, el la kameno elpromenas malfortaj radietoj kaj ili ekvibras sur la muro. La plumo falas el mia mano, la trankvila duonhelo min transigas en apatian sonĝon, kaj kun animo kaptita de mistera forto mi atente observas la kaprican ludon de la nigraj fantomoj. Ili venas, venadas, unu post alia: amikoj, konatoj. La fantomaro proksimiĝas al mi kaj samrapide ĝi malaperas, transdoninte la lokon al aliaj. —

II.

Tamen unu kapo re- kaj reaperas: blanka frunto sub helblondaj bukloj kaj brilaj okuloj en kara, pala vizaĝeto. Jen, denove la sama aperaĵo. Ĉu vere estas Vi, kara mia? Do fine Vi revenis. Kie Vi estis, kion Vi faris, parolu, rakontu al mi! — Sed ŝiaj lipoj restas senvortaj, kaj ŝia saĝa okulparo respegulas profundan, korŝiran doloron. Karulino, ĉu vi rememoras pri la iama amo? Pri la pasintjara Esperanta ekspozicio, ĉe kies malfermo la klubsekretario unuan fojon faris publikan paroladon, komence tremvoĉe, poste kuraĝe, fine eĉ la ministro gratulis lin, sed tiu manpremo por la sekretario ne estis pli valora — ol la varma albrilo de viaj parolemaj okuloj. Sekvis interkonatiĝo. Post la ekspozicio profesoro ekgvidis Esperantan kurson; vi ankaŭ aliĝis. La kurshoroj pasis rapide. Rapide kaj ĉarme. Foje la profesoro demandis vin:

„Kiom da manoj vi havas?“

Kaj vi respondis:

„Unu.“ Li korektis vin, ĉar li ne vidis, ke unu el viaj manoj — sub la benko — ripozis en la mano de l' apud vi „deĵoranta“ sekretario. Denove sonis demando:

„Kiom da koroj vi havas?“

Via respondo:

„Mi havas du.“ Li refoje korektis vin, ne sciante, ke vi kalkulis ankaŭ la alian koron, por vi flamantan . . . La kurso finiĝis, kaj vi — ne finlernis la mondlingvon. Kio estis la kaŭzo pro kiu oni vin riproĉis? — kompreneble la sekretario! Tiu, intencante senkulpigi sin, instruis vin dum privataj horoj. Poste vi skribis Esperante poŝtkartojn. Kaj foje alvenis respondoj sur delikataj japanaj bildkartoj, li laŭtleĝis la novaĵojn el malproksima oriento, dirante al vi la sencon de kelkaj nekonataj vortoj. Ho! tiuj kurskompletigaj „etimologiaj lecionoj“. Kiam li instruis al vi la Esperant-gramatikan pligradigon, kisklarigante al vi la „plej“-on de la dolĉeco. — Kiomfoje oni riproĉis tiutempe la sekretarion, pro nezorgado pri klubaj aferoj, pro malfideliĝo al la verda standardo, pro „bagatelemaj“ sentoj de egoista

La homa feliĉo.

Jida popola rakonto.

Vivis iam en malgranda urbo judo-riĉulo. Liaj kapitaloj estis tiel grandaj, ke mem li ne sciis, kiom da mono li posedas; infanojn li ne havis, kaj li kaj lia edzino estis jam tre maljunaj.

Kiam la fino de ilia vivo jam estis proksima, ili komencis meditati pri tio, al kiu estus plej bone postlasi la kolosan havaĵon. Longe pripensinte ili fine decidis foruzi la monon por la bono de la komunumo: ili do konstruigis preĝejojn, mal-sanulejojn, rifuĝejojn por malriĉuloj kaj multe, tre multe da aliaj similaj boncelaj institucioj.

La komunumo estis, kompreneble, kontentega pri tio, sed la gemaljunuloj, bedaŭrinde, pli kaj pli ĉagreniĝis, ĉar ju pli da mono ili foruzadis, des pli kreskis la kapitaloj, tiel, ke la solaj procentoj superis la monon foruzitan; do la pensoj, al kiu aŭ kio postlasi la havaĵon treege grandan, ne ĉesis ilin turmenti.

Iun fojon la riĉulo decidis veturi al la rabeno, por ricevi de tiu lasta saĝan konsilon. Dirite kaj farote. Li adiaŭis sian edzinon, jungigis la ĉevalojn kaj, lasinte al siaj oficistoj diversajn ordonojn, li forveturis. Kiam li alvenis al la rabeno, li tuj al li klarigis la kaŭzon da sia vizito kaj varme lin petis konsili al li. Atenteme la rabeno ĉion aŭskultis kaj, kiam la riĉulo finis sian rakonton, li diris al li jenon:

„Aŭskultu! Ni, hebreoj, kredas, ke ĉiu homo havas en la ĉielo sian protektanton, de kiu dependas la plenumo de l'deziro de la koncerna homo. Mi do donos al vi konsilon, kiel vi povos interferrilati kun via ĉiela protektanto: mi skribos al vi kelkajn talismanajn vortojn, kaj vi ilin ellernos parkere. Tion farinte, vi fastos tri diurnojn kaj la trian nokton je la 12-a horo vi iros en la arbaron, kie vi recitos tiujn vortojn. Tiam alvenos via protektanto ĉiela kaj konsilos al vi kiamaniere vi utiligu la monon kaj al kiu vi ĝin postlasu.“ Tion dirinte, la rabeno skribis la talismanajn vortojn kaj donis ilin al la riĉulo, kiu baldaŭ adiaŭis lin kaj reveturis hejmen.

Hejme la riĉaj gemaljunuloj ĝojis multe pri la talismanaj vortoj, sed baldaŭ iliaj mienoj fariĝis tre maldolĉaj, ĉar nek li nek ŝi deziris fasti tri diurnojn kaj ambaŭ ili timegis iri noktomeze en la arbaron! Subite li rememoris sian fraton, kiu loĝis en vilaĝo malproksima kaj kiu estis tre malriĉa, krome patro de sep filinoj jam edzinigendaj. Lia malriĉeco estis senlima, tre ofte mankis eĉ en lia hejmo peco da pano.

Do la riĉulo sendis sian serviston al sia frato, por ke li tiun venigu. Baldaŭ venis la frato kaj, tagmanĝinte, la riĉulo tiel al li diris: „Aŭskultu, Moseo, vi estas tre malriĉa kaj viaj sep filinoj ankoraŭ ne edziniĝis. Via mizero estas proverba kaj tial mi volas helpi al vi. Mi do donos al vi cent rublojn, sed vi devos fasti tri diurnojn kaj la trian noktomezon iri en la

arbaron, elvoki mian ĉielan protektanton kaj demandi lin, kiamaniere mi utiligu antaŭ mia morto mian monon kaj por kiu aŭ kio mi ĝin postlasu.“

Cent rubloj! — ekpensis la malriĉa Moseo — cent rubloj: Ja tian sumon mi ankoraŭ neniam posedis! Per ĉi tiu mono mi povos jam edzinigi ĉiujn sep filinojn, restos eĉ kelkdek rubloj ankoraŭ, per kiuj oni povus instali butiketon! — Kaj surprizite de tiu ĉi ŝajne neebla sciigo, li volis antaŭ ĉio komuniki tiun ĝojigan sciigon ankaŭ al sia edzino kaj li tiel diris al sia riĉa frato:

„Mi vin tre dankas pro via tiom malavara donaco, sed antaŭ ol mi ĝin konsentos, mi volas interkonsiliĝi kun mia edzino.“

Tion dirinte, li humile adiaŭis sian riĉan fraton kaj kuregis hejmen. Jam sur la sojlo de sia loĝejo li elkriis al la edzino:

„Sonjo! Ni estas savitaj!“ . . . Kaj preskaŭ unuspire li la tutan subitan feliĉon al ŝi rakontis.

Kelkajn horojn la gemalriĉuloj meditis pri tio, kion oni unue faros per la mono, sed baldaŭ Moseo adiaŭis sian edzinon kaj rekuregis al sia riĉa frato. „Nu“, li diris alveninte, „mi interkonsiliĝis kun mia edzino kaj mi konsentas la cent rublojn . . .“

Sed por riĉegulo tempo estas mono. Ja kelkajn horojn li atendis je sia frato, ĉu do li pro tio neniom gajnu? Do li tiel diris al Moseo:

„Vi interkonsiliĝis kun via edzino kaj konsentas, sed ankaŭ mi dume interkonsiliĝis kun mia edzino, kaj ni decidis doni al vi ne pli ol sepdek kvin rublojn . . .“

Do la malriĉa Moseo diris al sia frato, ke li ree devas rekuri hejmen, ĉar tian respondon de li, li ne supozis. Li do devas interkonsiliĝi ree kun sia edzino. Tion dirinte li reiris hejmen.

Hejme Moseo rakontis ĉion al sia edzino, kaj, iom pensinte, ŝi konsilis konsenti pri la sepdekkvin rubloj, ĉar tiu sumo ankaŭ povus helpi ilian mizeran situacion.

Esperplene do Moseo kuregis al sia riĉa frato kaj, veninte al li, diris: „Mi interkonsiliĝis kun mia edzino kaj mi konsentas pri la sepdek kvin rubloj . . .“

„Sed ankaŭ mi interkonsiliĝis kun mia edzino“, respondis la riĉulo, „kaj ni decidis doni al vi ne pli ol kvindek rublojn.“

Ree devis la kompatinda Moseo rekuri al sia edzino por ŝin konsulti. „Estu almenaŭ kvindek rubloj“, postkriis la edzino al Moseo, kiam li reiris al sia riĉa frato, „almenaŭ ni edzinigos tri filinojn per tiu mono. Se li donos al vi nur dudekkvin rublojn, prenu do ankaŭ!“

Ŝi ne eraris. Intertempe la riĉulo konsultis sian edzinon kaj decidis doni al Moseo ne pli ol dudekkvin rublojn.

Moseo konsentis eĉ tiun sumeton, kiun preninte kun la talismanaj vortoj, li hejmenreiris.

Li ellernis la talismanajn vortojn, fastis tri diurnojn kaj la trian nokton je la 12-a horo, akompanate de sia edzino, ĉar li timis iri sola, li iris en la arbaron.

Li diris la vortojn kaj jen ili ekaŭdis, kiel de malproksime oni trumpetas kaj kornetas kaj fascinaj torĉoj ekbrilis, kaj ili rimarkis proksimiĝantajn kaleŝojn orumitajn . . . El unu el la kaleŝoj subite eliris iu, vestita kiel princo, kun oraj medaloj kaj ora zono, kaj lin kelkdekŝ da servistoj ĉirkaŭis.

„Kion vi deziras?“ li demandis Moseon.

„Mia patro“, Moseo respondis, tremante, „sendis min al vi por demandi, kiamaniere li utiligu sian monon. Li estas jam maljuna kaj li tre malmulte faris por la komunumo. Ankaŭ li ne scias, al kiu aŭ kio postlasi sian havaĵon.“

„Jen, kion vi rediru al via frato: mi estas lia protektanto kaj mi zorgas ĉiam, ke li estu pli kaj pli riĉa kaj mi gardas lin kaj lian edzinon kaj lian havaĵon, kaj mi ne deturnas de ili miajn okulojn. Ankaŭ sciigu vian fraton, ke li ne zorgu pri sia heredonto, ĉar post unu jaro lia edzino naskos filon . . .“

Tion dirinte la princo kun la servistoj kaj kaleŝoj malaperis . . . Moseo kun sia edzino reiris, nenion survoje pro tio parolante, ĉar ili estis post tiu travivaĵo tre terurita.

*

*

*

Sed kiam ili hejmen revenis, la edzino atakis Moseon per plej fiaj insultoj: „Idioto, malsaĝulo! Estante en la arbaro, ĉu vi ne povis jam elvoki ankaŭ vian ĉielan protektanton? Ligna kapo! Kia estos la fino de via sorto? ! . . . Sep filinojn edzinigendajn vi havas sed eĉ ne unu groŝon . . .“

Moseo do decidis ree fasti tri diurnojn kaj demandi sian ĉielan protektanton pri la fino de sia sorto . . .

Li fastis kaj la trian noktomezon iris kun sia edzino en la arbaron. Li diris la talismanajn vortojn kaj jen ili ekaŭdis, kiel de malproksime iu iracas, piedpremaĉas . . . Subite antaŭ ili aperis ĝibulo, ĉifone vestita, per ŝnuro zonita, kaj pipon tenanta en la buŝo . . .

„Kion vi deziras?“ li demandis Moseon.

„Mi venis vin demandi, kio estos la fino de mia sorto? Malriĉa mi estas kaj mizera . . . Sep plenaĝajn filinojn mi havas kaj ili ankoraŭ ne estas edzinigitaj . . . Groŝon mi eĉ ne posedas . . .“

„Malsaĝulo!“ respondis la ĝibulo, „mi estas via ĉiela protektanto kaj mi zorgas, ke vin kaj vian familion premu ĉiam mizerego . . . Mi neniel allasas, ke vi iom perlaboru . . . Sed kiamaniere vi gajnis tiujn dudek kvin rublojn ĉe via frato? Nu, tre simple: mi neniam deturnas de vi la okulojn, sed tiam mi subite perdis la tubon de mia pipo. Mi do deturnis por momento la okulojn de vi por serĉi la tubon, kaj en tiu momento vi gajnis la 25 rublojn . . .“

Laŭ jida lingvo Esperantigita de
J. Lejzerowicz.

Dolora deziro.

(Premiita per la „Natura Floro“ dum la IX-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Manresa.)

*Medite mi sidas ĉe forno malvarma . . .
Jam longe la lignon cindrigis la flam' . . .
En ĉambron sin ŝtelis la frosto malĉarma,
kaj trene sin frotas mano al man' . . .
Nur pecon da ligno, nur pecon da karbo,
kaj havos denove vi fajron en forn'!
Do faru! Ekbruu veado de l' arbo!
La zumo krakanta vin lulu al dorm'!*

*Rigidaj la manoj por vigla ekmovo,
kaj ili inerte faletas sen far' . . .
Revantaj okuloj kun laca ektrovo
nun miras fajron el sub la cindrar' . . .
Malvarma kaj eta mortanta brileto,
simila al mia pasanta vivsent',
ho, mortu silente, ĉar vana la peto
kaj vana la vivo, se mordas nin pent'!*

*Mi frostas . . . Malvarme, ho kiel malvarme!
Soleco min premas kaj vindas mallum' . . .
La ombroj de mebloj viciĝas nun svarme:
amorfaj kadavroj naskitaj de l' lum' . . .
Nun ŝajnas, ke ili min tente allogas
por klini la kapon al dormo sub ter' . . .
Jes! . . . Vere! . . . Mi kial feliĉon arogas,
se lasis min for la vivĝoj' kaj esper'?!
Ho! Kiel mi ŝatus kun lasta rebrilo
de tiu fajrero fordormi sen voĉ'!
Ho! Kiel mi ŝatus kun morta trankvilo
forporti la ombbron kun mi sen riproĉ'!
Sufiĉas la vivo! Mi morton sopiras,
trankvilon eternan por mia anim' . . .
Kaj tamen . . . fajron de l' koro mi miras . . .
Ĝi sklave min ĉenas al vivo kun tim' . . .*

*Malvarma kaj eta mortanta brileto,
vi palpebrumanta espero en sin',
ho, mortu silente, ĉar vana la peto:
la vivo ne havas indulgon ĉe l' fin' . . .
Mi perdis ja ĉion: edzinon, filinon,
kaj ilin forprenis ne Morto, sed Viv'.
Nun sola vaganta mi ploras ruinon
de l' hejma fajrejo kun mortosoif' . . .*

*Rigidaj la manoj por nova konstruo,
kaj mankas la forto por firma mason'.
La koron okupis mortvoka enuo,
kaj preter mi pasas senhalte la bon'.
Vivigas min unu: dolora deziro,
je kiu sopiras ĉi laca anim',
ke flustru filino kun kisa alspiro:
„Patreto, vi kara, tre amas mi vin!“*

Julio Baghy.



Vento kaj nuboj.

Norde, ĉe la mara bordo,
plendas plore vent' ĝemsona.
Norde, ĉe la mara bordo,
revas jen knabin' estona.
Ŝia revo — rev' de l' plendo.
Dronas ĝi en sent' amara.
Plendan ploron norda vento
portas al la land' hungara.
Sude, ĉe l' Danuba bordo,
fulmkaŝanta nuboj nigras.
Sude, ĉe l' Danuba bordo,
knab' hungara reve migras.
Lia revo — rev' de l' sudo:
pereiga fort' ciklona.
Ardan amon suda nuboj
portas al la land' estona.
Sin renkontas nord' kaj sudo
sur senlima oceano.
Plend' de l' vento, fulm de l' nuboj
jen fariĝas uragano.
Fajre fulmas arda amo,
plenda ploro veas . . . veas.
Pro la sentoj en la flamo
knab', knabino brulpereas.

Julio Baghy.

Mateno.

Aŭror' purpura,
aero pura,
birdarkoncertoj
sur arbovertoj.
La freŝa roso
en herbhaoso,
nektar' de dioj,
sub sunradioj
brilanta marko
de l' ĉielarko.
La suno brila
je fajr' simila,
en okcidento
la lunarĝento.
La varmo venas,
kaj ĉio benas
radion sunan,
eterne junan.
Jen venis tago
kun laborago
kaj viva bruoj.
Sub ĉielbluoj
la herboj floras,
la Dion gloras.

Petro Stojan, L. K.



Feliĉo de l' poeto.

Kiel agrable esti poeto —
Mondojn kreadi per sorĉo de vorto,
Sinjoro esti de viv' kaj morto,
De grandaj revoj esti profeto.

Foje aperi en brilo, forto,
Blindigi per la fulmoj de plumo,
Ruĝa aperi en sun-orumo,
Kaj pri estonta tondri la sorto.

Kaj foje kiel sun' subiranta,
Kiel la eĥa lasta ekkrio,
Kiel perdita hela vizio —
Adiaŭ diri per ploro kanta.

Sed foje ankaŭ per ironio
Vipi de koroj ŝelon rigidan,
La lingvon havi die-senbridan,
Poeto esti — agrablo tio!

*Stanislav Braun,
Lodz (Polujo).*



Scienco.

Signoj de Morse.

De V. Jaroŝ, Mistek, Ĉsl.

II.

En mia artikolo en la antaŭa numero de „Revuo“ mi klarigis, ke la Morse'a signaro uzas punktojn kaj strekojn por la alfabeto, la ciferoj, la interpunkcioj kaj por specialaj ĉifroj. Plue mi klarigis manierojn por signali per flago, per lumo, per mano aŭ per fajfilo, laŭ la signaro de Morse. Hodiaŭ mi montros la ŝlosilon, kiu ebligos al ĉiu — post kelka ekzercado — la interkompreniĝon per la Morse'a signaro.

La alfabeto laŭ Morse.

Signoj bezonataj por signali en la lingvo Esperanto.

| | | | | | | | |
|---|--------|---|--------|---|--------|---|--------|
| a | .— | g | — — . | l | .— .. | r | .— . |
| b | — ... | h | | m | — — | s | |
| c | — .— . | i | .. | n | — . | t | — |
| d | — .. | j | .— — — | o | — — — | u | .. — |
| e | . | k | — .— | p | .— — . | v | ... — |
| f | .. — — | | | | | z | — — .. |

La Esp. literojn kun supersignoj oni povas provizore signi laŭ la metodo montrita de Zamenhof mem (ĉ = ch, ĝ = gh, ĥ = hh, ĵ = jh, ŝ = sh, ŭ = u).

Bone estas, se oni scias ankaŭ la signojn ne uzatajn en Esperanto, ekzemple:

| | | | | | |
|---|-----------|---|--------|----|---------|
| ä | .— .— | ü | .. — — | q | — — .— |
| á | .— — .. — | y | — .— — | x | — . — |
| é | .. — .. | w | .— — | ch | — — — — |
| ö | — — — . | | | | |

La ciferoj.

| | | | |
|------|--|---|-----------|
| 1 | .— — — — | 6 | — |
| 2 | .. — — — | 7 | — — ... |
| 3 | ... — — | 8 | — — — .. |
| 4 | — | 9 | — — — — . |
| 5 | | 0 | — — — — — |
| 10 | .— — — — / — — — — — | | |
| 11 | .— — — — / .— — — — | | |
| 12 | .— — — — / .. — — — | | |
| 20 | .. — — — / — — — — — | | |
| 32 | ... — — / .. — — — — | | |
| 95 | — — — — . / | | |
| 136 | .— — — — / ... — — / — | | |
| 1258 | .— — — — / .. — — — / / — — — .. | | |

Por pli bona enmemorigo servu jena tabelo:

| | | | |
|-----------|---|-----------|----|
| . | e | — | t |
| .. | i | — — | m |
| ... | s | — — — | o |
| | h | — — — — | ch |
| | 5 | — — — — — | 0 |
| . — | a | — . | n |
| . — — | w | — .. | d |
| . — — — | j | — ... | b |
| . — — — — | 1 | — | 6 |
| .. — | u | — — . | g |
| .. — — | ü | — — .. | z |
| .. — — — | 2 | — — ... | 7 |
| ... — | v | — — — . | ö |
| ... — — | 3 | — — — .. | 8 |
| — | 4 | — — — — . | 9 |
| . — . | r | — . — . | c |
| . — .. | l | — . — | k |
| .. — — | f | — . . — | x |
| — . — — | y | — — . — | q |
| | | | ä |
| | | | p |

Signoj de interpunkcioj.

| | | | |
|----------------|-------------|-------------------|-------------|
| Punkto (.) | | Demandsigno (?) | .. — — .. |
| Komo (,) | . — . — . — | aŭ | ... — — . |
| Dupunkto (:) | — — — — ... | En- kaj elkonduka | |
| Punktokomo (;) | — . — . — . | signo (“) | . — ... — . |
| Voksigno (!) | — — — — — | Parentezo ([]) | — . — — . — |
| Apostrofo (') | . — — — — . | Dispartigo (-) | — ... — . |

Diversaj signoj.

| | |
|-------------|-----------------------------|
| Kruco (+) | . — . — . |
| Egaligo (=) | — ... — |
| Frakcio (/) | — — — — — |
| Komenco | — . — — . — |
| Nova linio | — ... — |
| Substreko | .. — — . — |
| Eraro | |
| Fino | ... — . aŭ „ar“ . — / . — . |

(Signalante per flago, oni montras finon, farante trifoje rondon per la flago antaŭ la kapo.)

Specialaj signalvortoj.

| | |
|------------------|---|
| — . / — . — | Hallo!! (Ekvoko „nk“.) Eksignalo por doni sciigon. |
| — . aŭ — . / — . | („n“ aŭ „nn“) La respondo de l'akceptanto al la ekvoko. |
| — — / — — / — — | („mmm“) Helpu! |

| | |
|------------------|--------------------------------|
| | („h“) Ripetu! |
| — | („v“) Venu! |
| —... / —. | („dn“) Restu! |
| ... / .. — / .., | („sui“) Malrapide! |
| —..... — | („nst“ aŭ „du“ aŭ „ba“) Paŭzo. |

Pri la denseco de la Universo.

Ĉerpita el la „Astrofiziko“ de Scheiner.

Per la helpo de la moderna naturscienco ni estas kapablaj formi al ni al la realeco sufiĉe similantan bildon pri la Universo. Precipe ni apogas nin sur la astronomion kaj astrofizikon.

Sole karakterizaj por la Universo estas spaco kaj materio, la proporcio inter spaco kaj materio. Ni devus kalkuli per ne-imageble grandaj nombroj, kiuj malhelpus nin klare vidi tiun ĉi proporcion. Tial ni eliru de unu litro da akvo kaj de ĝia pezo, de 1 kilogramo. Se ni milobligos la litron, ni ricevos 1 kubikmetron da akvo kun la pezo de 1000 kilogramoj. Tiel kalkulante 1 kubikkilometro da akvo pezas 1 bilionon da kg. La volumeno de nia tero estas ĉirkaŭ 1 biliono da kubikkilometroj kun la pezo de $5\frac{1}{2}$ kvadrilionkilogramoj. La amplekso de la Luno estas ĉ. 350 000 foje pli granda, ĉ. 2 kvintilionoj da kg. Sed nia Suno estas proporcie malgranda fiksa stelo. Ni povas supozi, ke la ceteraj steloj havas duoble pli grandan amplekson. Kaj ni povas ankaŭ supozi, ke la nombro de la fiksaĵ steloj de nia sistemo estas 1 biliono. Tiel ni atingos la rezultaton ke la pezo de nia stelosistemo estas ĉ. 4 septilionoj da kg., skribata kun 42 nuloj.

Jen estas vere grandioza amplekso, kaj ni admiras la naturon pro ĝia grandiozeco! Sed komparante tiun ĝi amplekson kaj la spacon, kiu apartenas al ĝi, ni vidas ĵus la kontraŭon. Nia sunsistemo okupas tian sferon, kies duon-diametro estas almenaŭ tiom, kiom la distanco inter Suno kaj Neptuno. Tiu ĉi distanco estas 4467 milionoj da kilometroj, la volumeno de l' sfero estas 373 000 kvadrilionoj da kubikkilometroj! T. e.: la meza denseco de l' sunsistemo estas tiom, kiom la dolĉeco de 165 243 000 litroj da akvo, se ni aldonas 1 gramon da sukero. 165 243 000 litroj estas la volumeno de tia kubo, kies latero estas 57 metroj. Se ni imagas du tiajn kubojn, la unuan plena da normala aero, la enhavon de la dua tiel densan kiel la sunsisteman sferon, ni konstatos ke la normala aero estas 230 milionoble pli densa ol la sunsistema sfero.

Sed la jam priskribitaj aferoj etiĝas rilate al la granda sistemo de l' fiksaĵ steloj. La plej proksima fiksa stelo estas 200 000 foje pli malproksime de ni ol la suno kaj la plej malproksima fiksa stelo estas ankoraŭ milfoje pli malproksime. Inter la fiksaĵ steloj estas tiu distanco, kiu inter suno kaj la plej proksima fiksa stelo kaj la amplekso de la fiksaĵ steloj estas duoblo de tiu de la suno. Tiel kalkulante, la fiksaĵ steloj troviĝas en la

mezo de tiaj sferoj, kies duon-diametroj estas ĉ. 3500 oble pli longaj ol la duon-diametro de la sunsistema sfero. Do la denseco de l' stelsistemo estas 10 trilionoble pli malgranda ol tiu de l' sunsistemo.

Ni daŭrigu! Nia stelsistemo estas spirala nebulo kaj tia nebulo estas ĉiu alia stelsistemo. Ni supozu, ke tiuj sistemoj estas egale grandaj. Ĝenerale ni rajtas tion supozi. El la ŝajna diametro de ĉiu sistemo ni povas determini ĝian distancon. La diametro de l' Andromeda nebulo estas 3⁰, do ĝi estas 20 oble pli malproksima de ni ol la longeco de l' stelsistema duon-diametro. Kaj en la „Ĉashundo“ estas nebulo 300 oble pli malproksima. Kalkulante meze 100 stelsistemajn duon-diametrojn ni atingos la rezultaton, ke la meza denseco de l' videbla Universo estas 10 kvadrilionoble pli malgranda ol tiu de nia atmosfero.

Por ke ni povu iamaniere imagi tiun ĉi proporcion, ni prenu kubon kun 1 kilometra latero, plenan da aero. Ĝia pezo estos 1 300 000 000 kg. Se la aero en la kubo estus nur tiel densa, kiel la meza denseco de l' Universo, ĝia pezo estus nur la 10 000 onono de 1 miligramo. Kaj kio estas tio ĉi rilate al la grandega spaco?!

La plej malgranda ero de la maso estas la atomo. La diametro de la hidrogenatomo estas nur dumilionono de unu milimetro, ĝia maso nur 1/6 kvadrilionono de unu gramo. Do en unu kubikkilometro troviĝus nur 160 000 atomoj, en la spaco de 5 kubikdecimetroj nur 1 atomo.

Ni do povas konkludi, se eĉ la rezulto de nia kalkulo estus 1 000 oble pli malgranda ol la realeco, ke la materio de la Universo, al kiu plektiĝas nia vivo, estas eta, treege eta rilate al la grandega spaco.

Jozefo Major, Budapest.

Silab-Enigmo.

a, bu, e, e, jo, jo, na, no, o, po, ra, ra, ri, ro, ro, ro, ta, ti, to.

Oni kunmetu la silabojn tiamaniere, ke rezultas ok diversaj vortoj, el kiuj :

1. fluas tra la Pirenea duoninsulo,
2. estas muzo,
3. troviĝas en la homa korpo,
4. ornamas la papon,
5. vivas en marĉo,
6. estas armilo de l'elefanto,
7. revenas ĉiujare,
8. estas valora metalo.

La komencaj literoj de ĉiu vorto, legataj de supre al malsupre, signifas teruran akcidenton, kaj la triaj literoj de ĉiu vorto nomas la landon, kie okazis la akcidento.

(Solvo en la oktobra numero.)

„Blindaj“ almozuloj.

Du „blinduloj“ staras ĉe la pordo de nia ĉefpreĝejo.

La unu al la alia: Diru al mi, kara frato, ĉu vi konas la sinjoron, kiu donis al vi du lirojn?

La alia (ĵaluza): Mi konas lin malbone . . . lian vizaĝon sole!

Sendis: V. de Benedetto, Lecce.